

EL SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio	El Vol. 26 n-ro 4/5 (114/115) 30.10.1975.
---	---

PRI LA KOMPLEKSASJ VORTOJ EN ESPERANTO

{A. Lienhardt, Mulhouse, Francio} &/

1. KIEL KLARIGI KOMPLEKSASJN VORTOJN AL ESPERANTO-LERNANTOJ

1.1/ ESPERANTO : LINGVO AGLUTINA

Unu el la geniaj proprecoj de Esperanto estas, ke ĝi estas lingvo aglutina; tio signifas: ĝia vortaro konsistas grandparte el vortoj derivitaj kaj kompleksaj (t.e. kun-metitaj), formitaj per kun-meto de memstaraj vorteroj havantaj ĉie kaj ĉiam la saman signifon.

Estas relative facile, klarigi al novaj lernantoj la funkcion de la afiksoj (prefiksoj kaj sufiksoj), fiksitaĵoj al la radikoj (radikvortoj) por formi derivitajn vortojn, ekzemple *dik'ulo*, *mal-dik'ulo*, *dik'ul'ino*, *mal-dik'ul'ino*, *dik'ul'in'eto*, k.s. Sed iuj komencantoj, kies nacia lingvo ne estas aglutina, ofte ne povas tuj kompreni du-radikajn vort-kunmetojn. Oni komparu, ekzemple, *fer'vojo* (t.e. fera vojo, fero-vojo) kaj ties aglutinajn tradukojn itala *ferrovia*, hispana *ferrácar-ril*, sveda *jörnväg*, germana *Eisenbahn*, angla *railway* (rel-vojo), nederlanda *spoorweg* (ŝpur-vojo), turka *demiryolu* (fer vojo) unu-flanke, kun la ne-aglutinaj tradukoj franca *chemin de fer* (t.e. vojo el fero), portugala *caminho de ferro*, rumana *cale farrata* k.s. alia-flanke.

1.2/ KOMPLIKAJ VORTAĴOJ

La afero ankoraŭ plie komplikiĝas, kiam lernantoj renkontas plur-elementajn vortaĵojn, aŭ certajn vortegojn kiuj aspektas strange artefaritaj, aŭ kias senco tute ne estas klara. Kiam oni esploras, kun atentaj okuloj, la Esperanto-literaturon kaj -gazetojn, oni povas fari riĉan rikolton da tiaj specimenoj. Jen kelkaj el ili, notitaj preter-pase, kun komentoj inter krampoj: unuavide (unu-avide? - unua-vidē?), poparta (po-parta? - pop-arta?), duetapa (due-tapa? - du-etapa!), kurtonda (kur-

&/ 24 ave de Riedisheim, F-68100 MULHOUSE, Francio

tonda? kurt-onda!), balotrajto (balo-trajto? - balot-rajto!), grimpeka-kursoj (ekskursoj kun grimrado), vualkatenita (vualka-tenita? - vualkatenita!), porknabara (pork-nabara? - por-knabara!), maŝinspire (maŝinspire), krepuskombre (krepus-kombre? - krepusk-ombre!), influfero (influsfero? - influ-sfero, influo-sfero!), monofero, paperkorbo (korbo por papero? - korbo el papero?), hundoviando (hundaĵo, viando el hundo? - viando por hundo?), ĉefmanĝo (ĉefa manĝo? - ĉefo-manĝo, manĝo por ĉefo?), popolmuzeo (muzeo de popolo? - m. por popolo? - m. pri popolo? - m. pri popoloj - etnografia muzeo?), malvarmummalsanoj, pasaĝerelirejo, firmadecidemulo, malriĉkampanaro, nacimalplimulto, industriakvoelfluo, malfrusomermateno, gasojlekflamiĝpunkto (temperaturo de ekflamiĝo gaso, aŭ gas-oleo), aerpremmezurilo, vagonaksrompiĝo, trajnuzantaro, drinkejporde, danĝeralvoko, perŝirmilfalantoj (paraŝutistoj!), senantaŭjuĝa, fifamkonataj, laborkondiĉesplorado, jarĉefkunveno, ludtempmezuristoj ... kaj multaj aliaj.

Estas menciinde ĉi tie, ke d-ro Zamenhof mem saĝe konsilis uzadi - ĉiam kiam eble - formojn simplajn anstataŭ kun-metitaj (Vidu en P.I.V. pĝ 838.). Kontraŭ troigoj en kun-metado de vortoj trafe argumentis ankaŭ prof. G.Waringhien en lia rekomendinda verkaĵo "Lingvo kaj vivo" (pĝ 121) kaj en la elstara artikolo "La lingvo kaj stilo de Zamenhof", aperinta en Heroldo de Esperanto n°1527, junio 1972.

1.3/ LA KERNO DE LA TEMO

Por klare videbligi, kie troviĝas la kerno de la ĉi tie pri-traktita temo, estas oportune kompari, unu-flanke, la silabodon de radikvortoj kaj, alia-flanke, la dis-erigon de la gramatikaj elementoj en kompleksaj vortoj.

La tegantoj de iu latinlitera lingvo memoras pri la strukturo de la radikvortoj dank al la sin-sekvo de ties silaboj. Jen kelkaj diverslingvaj ekzemploj:

- A: atack (a-tack), bandoleer (ban-do-leer), climatic (cli-ma-tic), demonstrable (de-mon-stra-ble), illegitimacy (il-le-gi-ti-ma-cy),
 B: baque (a-ba-que), bactérie (bac-té-rie), curatif (cu-ra-tif), devanture (de-van-tu-re), considération (con-si-dé-ra-tion), ...
 C: atend (A-bend), bedrohen (be-dro-hen), diktatorisch (dik-ta-to-riŝch), Elektrizität (E-lek-tri-zi-tät), experimentieren (ex-pe-ri-men-tie-ren),
 F: babelo (ar-ĝe-lo), babilo (ba-bi-li), delikata (de-li-ka-ta), elektriko (e-lek-tri-ko), faktorialo (fak-ti-ri-a-lo), kotiledono (ko-ti-le-do-no), observatorio (ob-ser-va-to-ri-o), k.a.

Male, kompleksajn vortojn oni ĝenerale dividas laŭ ties gramatikaj elementoj (de ne laŭ la silaboj), ekzemple:

- A: afterages (after-ages, ne after-rages), broadsword (broad-sword, ne broads-word), cauliflower (cauli-flower, ne cau-lif-lower), headache (head-ache, ne hea-dache), ...
 G: abarbeiter (ab-ar-beiten, ne a-bar-beiten), Beinkleid (Bein-kleid, ne Be-ink-leid), Damenabteil (Damen-ab-teil, ne Dame-nab-teil), Einakter (Ein-akter, ne Fi-nak-ter), ...
 E: amafero (am-afero, ne ama-fero), amikaro (amik-aro, ne ami-karo), apogarko (apoc-arko, ne apc-garko), aprobinda (aprob-inda, ne apro-binda), arbaristo (arb-ar-isto, ne arba-risto), blukula (blu-okula, ne bluo-kula), deflankiĝi (de-flank-iĝi, ne def-lan-ki-ĝi), ekaperi (ek-aperi, ne ekaperi), invitafiŝo (invit-afiŝo, ne in-vita-fiŝo), malamikeco (mal-amik-eco, ne ma-la-mi-ke-co), misedziĝo (mis-edz-iĝo, ne mi-se-dzi-ĝo), mondonacoj (mon-donacoj, ne mondo-nacoj), senofica (sen-ofica, ne sero-fica), k.m.a.

Estas konate, ke lernantoj de Esperanto esploras ne-konatan vorton unue laŭ la sin-sekvaj silaboj. Se la koncerna vorto estas radikvorto, ekz-e "maraskino", ili ĝuste legos "ma-ras-ki-no", ne mise "mar-ask-ino"; serĉante la vorton en vortaro por franc-lingvuloj, ili trovos "marasquin" (liqueur). Male, se temas pri vorto kun-metita, ekz-e "domestrino", ili unue mislegos laŭ-silabe "do-mes-tri-no", kaj nur poste divenos ke temas pri kompleksa vorto: "dom-estr-ino". Estus facile fari liston kun multaj tiaj ekzemploj, kiuj ofte faras kap-doloron al novuloj, precipe al junaj, ankoraŭ ne-tre-kleraj lernantoj.

Alia punkto, nepre atentinda, estas la jena: Komencantoj ne povas distingi certajn radikvortojn de prefikso-havaj vortoj. Ni komparu, ekzemple, aliri, almeti, alporti, alveno k.a. kun almozi, alterni, aleno, alizo k.a.; delasi, desalti, demeti, depreni, deteni, k.a. kun debati, decidi, deĉifri, defendi, deĵori, deklami, deklari k.a.; ekaŭdi, ekvidi, ekbrulo k.a. kun eklipsi, ekrano, eklezio, eklektika k.a.; eksigi, eksigi, eksmoda, eksedzoeksreĝo, eksocicisto k.a. kun ekscese, ekskurso, ekspedi, ekspliki, eksplodo, eksporto, ekstrema k.a.; foresti, formeti, forigo, forigi, formanĝi, forpreno, forporti k.a. kun forgesi, formala, formato, formacio, formiko, formolo, formulo k.a.; perforti, perludi, pergajni, perlabori, permene, perbuŝe k.a. kun percepti, permesi, permuti, perturbi, perfekta, perkalo, persiko, persono k.a.

Konsiderante ĉion tion, la legantoj de ĉi tiu traktaĵo certe komprenos, ke relative granda aro da lernantoj sentas iom da senkuraĝiĝo ĉiu-foje, kiam ili renkontas vortojn kiuj, unua-vice, estas rebusaj por ili. Iom post iom kreskas la malagraba impresio, ke Esperanto videble ne estas tiel simpla, kiel ŝajnis en la unuaj lecionoj; sekve, la entuziasmo ĉiam pli kaj pli svenas, kaj la emo daŭrigi la lernadon rapide velkas....

1.4/ DU SIMPLAJ REGULOJ

Tamen, estas facile proponi rimedon kontraŭ tiu fatala situacio: Sufiĉas klare videbligi la unuopajn elementojn de kompleksaj vortoj, aplikante en novaj lernolibroj, perfektigaj libroj, legolibroj kaj en ĉiuj didaktikaj tekstoj la du ĉi sekvantajn regulojn:

1.4.1/ *En kompleksaj vortoj, post substantivaj kaj adjektivaj kaj verbaj vortelementoj kun fina vokalo (ekz-e maro, alia, pagi) kaj post prefiksoj, prefiksoidoj kaj numeraloj, estas oportune intermeti ligo-streketon (-).*

Tiu regulo jam estas uzata, pli malpli ofte, fare de E-aŭtoroj, redaktoroj kaj kursgvidantoj. Ekzemploj: amo-kanto, bovo-viando, Dio-servo, kurso-rino, maro-bordo, sano-stato, vivo-ĝojo, abelo-svarmo, atomo-pezo, doloro-sento, folio-rando, genuo-kavo, lingvo-uzo, ananaso-torto, industrio-centro, krokodilo-larmoj, mirabelo-brando, tualetosapo, aluminio-drato, internacia-lingvo; certa-grade, alia-parte, nacia-skale, propra-sence, mia-flanke, tia-maniere, arte-farite, ĉiu-tage, sin-garda, mem-stara, ...; pagi-pova, scii-vola, vivi-kapabla, k.a.

Ekzemploj kun prefiksoj kaj prefiksoidoj: al-paroli, anstataŭ-igi, antaŭ-pagi, antaŭen-iri, apud-vilaĝa, bo-filino, ĉe-piede, ĉirkaŭ-preni, de-vojigi, dis-peli, dum-somera, ek-salti, eks-edzino, ekster-landa, el-teni, en-kasigi, for-veturi, ge-avoj, ĝis-ebrie, inter-agi, kontraŭ-diri, krom-persono, kun-labori, kvazaŭ-homo, laŭ-mezure, mal-feliĉe, malgraŭ-vole, mis-kompreni, ne-aktiva, per-labori, por-informe, prefabriki, preskaŭ-rimo, pri-diskuti, pro-memora, re-generi, retro-iri,

sen-okupa, sub-tegmento, super-homo, sur-genue, tra-rigardi, trans-oceana; unu-aĵo, du-eco, tri-igi, kvar-iĝi, kvin-ilo, ses-oble, sep-ono, ok-ope; du-dek, tri-cent, kvar-mil, mil-foje, kiom-foje, pli-multo; unua-vice, dua-ranga;...; sen-de-penda, re-kun-veni, bo-ge-patroj, bapto-ge-patroj kaj aliaj.

1.4.2/ En kompleksaj vortoj, post substantivaj, adjektivaj kaj verbaj vortelementoj kies fina vokalo estas eliziita (ekz-e: mar', ali' pag') kaj post sufiksoj sen fina vokalo (ekz-e: ar', et', id') - estas oportune meti apostrofon ('), aŭ vertikalan disigan streketon, similan al tiu kiun uzis d-ro Zamenhof en sia "Universala vortaro" aldonita al "Fundamento de Esperanto".

Jen kelkaj ekzemploj: ali'flanke (alia-flanke), aer'premo (aero-premo), bon'gusta (havanta bonan guston), bon'tagon (bonan tagon), eduk'arto (eduko-arto, arto eduki), foli'rando (folio-rando, rando de folio), genu'kavo (genuo-kavo, kavo de genuo), glaci'ŝranko (glacio-ŝranko), juni'tagoj (junio-tagoj), kopi'rajto (kopio-rajto), maten'manĝo (matena manĝo), tag'manĝo (tag'meza manĝo), naci'lingva (nacia-lingva) ole'plantoj (oleo-plantoj), pian'ludi (piano-ludi, ludi pianon), pasi'plene (pasio-plene, plene je pasio), sek'okule (seka-okule, kun sekaj okuloj), sever'more (severa-more, havante severajn morojn), simi'kaĝo (simio-kaĝo, kaĝo de simioj), staci'domo (statio-domo, domo de stacio), fervoj'stacio (fervojo-stacio, fer'voja stacio), ŝose'mezo (ŝoseo-mezo, mezo de ŝoseo), tibi'karno (tibio-karno, suro), vual'ŝtofo (vualo-ŝtofo, ...; am'doloro, fer'fadeno, film'teatro, glob'krajono, hom'amaso, kap'kuseno, kulp'atesto, lip'anguloj, mon'afero, nom'indiko, ter'etaĝo, alarm'signalo, alvok'sekreto, aŭtun'mateno, bier'botelo (botelo por biero), botel'biero (en-botela biero, biero en botelo), facil'anima, honor'afero, kalkul'eraro, opini'esprimo (opinio-esprimo), amoniak'odoro, sediment'analizo (analizo de sedimentoj), k.m.a.

Ekzemploj kun sufiksoj: bel'aĵo, dom'eto, urb'ego, vid'ebla, sabl'eraj, fal'igi, fal'iĝi, glaci'iĝi, labor'iloj, il'aro, ul'inoj, ...; arb'ar'isto, fal'ig'inta, bon'kor'eco, est'aĵ'etoj, inst'u'ist'aro, labor'il'aro, vid'ind'aĵoj, vojaĝ'ofic'ejo, ...; aer'prem'mezur'ilo (prefere: mezurilo de aero-premoj), dom'pord'ŝlos'ilo (prefere ŝlos'ilo de domo-pordo), amoniak'gas'produktado (prefere produkt'ado de amoniaka gaso), k.a.

NOTO. La reguloj (1) kaj (2) ĉi supre formulitaj estas aplikeblaj ankaŭ sam-tempe, en miksitaj kompleksaj vortoj.

Ekzemploj: mal-fort'iĝi, kun-ven'igis, el-ŝip'iĝo, en-ir'ejo, divers'de-venaj, ekster-land'anoj, du-on'-ombra, gorg'-mal-sano, post-tag'meze, dis-vast'iĝo, pli-bel'iĝas, mal-ĝoj'iga, pli-long'igas, trink'ejo-pordo (pordo de trink'ejo), ne-kalkul'ebla k.a.

1.5/ ELIZIO ESTAS EVITENDA

Ĉi rilate, estas utile fari la jenan rekomendon: En kompleksaj vortoj, verkistoj laŭeble evitu elizii. Ni esploru, ekzemple, la pri-sportan terminon "glacihoke-ludkampo" kiu, je unua al-rigardo ne estas tre facile analizebla; krome, la prononco estas iom problemeca: multaj legantoj inklinos prononci "glaci~~h~~okeludkampo"; tio sonas nek nature, nek eŭfonie. Sed kiam ni skribas "glacio-hokea ludo-kampo" (do kun tri aldonaj vokaloj), tiam la analizo de la kun-metaĵo estas videble facila, kaj la prononco estas belsona (glacio-hokea ludo-kampo), simile al la itala lingvo - kiu havas la reputacion de "bele sonanta lingvo". Sekve, necesas demandi: Kial iuj verkistoj skribas "skikuro" (sonanta kiel Merkuro kaj "sciuro"), aŭ "markolo" (sonanta kiel "kukolo" kaj "tombolo") aŭ "trukarto" (sonanta kiel "mustardo" kaj "inkvarto"), anstataŭ "skio-kuro" (skio-kurado, kurado per skioj), "maro-kolo" (mara kolo, ŝanelo), "truo-karto" (truo-hava karto por komputiloj)?

Por doni laŭ-eble fortan reliefon al ĉi tiu pri-traktado, je ekzemple la du unuaj versoj de iu fablo, unue kun elizioj, poste sen elizioj:

- a) Sur *pom'arb' sidiis kort'bird'*,
kaj *vir'kat' ĉe la arb'trunk'* (ktp)
- b) Sur *pomo-arbo sidiis korto-birdo*,
kaj *viro-kato ĉe la arbo-trunko* (ktp)

La unua verso-duopo aspektas kripligita; ĝi sonas dure, krude, abrupte, same kiel iu lingvo robota; male, la dua aspektas ne-kripligita kaj sonas klare kaj melodiece, do vere kiel lingvo viva ĝusta.

1.6/ ALDONO

Se ja estas rekomendinde uzi ligo-streketojn kaj apostrofojn sufiĉe ofte, eĉ abunde, en didaktikaj tekstoj, tio ne signifas, ke ili ne estu uzataj laŭ-eble ankaŭ en iuj aliaj tekstoj. Sendube, ĉiuj Esperanto-verkistoj kaj -redaktoroj deziras, ke niaj kursanoj kaj postkursanoj lingve perfektigu plej-eble baldaŭ, legante E-gazetojn kaj E-literaturen beletran kaj diversfakan. Sed por ke la novuloj en niaj vivoj povu pli facile legi kaj pli rapide kompreni gazetajn artikolojn kaj literaturajn verkaĵojn, la kunmetitaj vortoj devas aperi sen-pere analizeblaj kaj tuj kompreneblaj antaŭ la okuloj de la legantoj ankorau ne tre spertaj. Tial, estas ne-kontesteble, ke ligo-streketoj kaj apostrofoj (uzataj celkonforme, do nek tro, nek maltro!) estas valoraj helpiloj por atingi la deziratan rezultaton. Tiuj helpiloj ebenigas al novaj lernantoj - kaj ankaŭ al malnovaj - la vojon al iom-post-ioma plena posedo de la lingvo.

Eble, iuj legantoj de ĉi tiuj linioj opinias, ke multaj disigaj signoj "malbeligas" la tipografian aspekton de presitaĵoj. Pri tiu opinio necesas diri: (a) diskuto pri la "beleco" de tipografiaĵo estas vana, ĉar, laŭ-proverbe, "pri la gustoj kaj koloroj ne akordas eĉ doktoroj"; (b) legantoj facile kaj rapide kutimiĝas al la koncernaj help-

signoj; (c) relativa multeco de tiuj helpsignoj estas bone tolerebla, konsiderante la grandan avantaĝon kiun ili havigas al novuloj en lernado de la lingvo.

Fine, iuj legantoj eble pensas, ke ligo-streketoj sufiĉas, kaj ke apostrofoj ne estas necesaj. Tiu-rilate, utilas atentigi ke, mult'okaze, la apostrofo havas kroman funkcion: marki la flankan akcenton de la antaŭa silabo, ekz-e *alkohol'* malpermeso, *aŭtom'* energio, *literatur'* juvelo, *aŭtomobil'* riparejo k.s. Tiu aspekto de la afero estas detale pritraktita en la & 6.2. de la broŝuro "Modela prononco de la interlingvo Esperanto" (represaĵo el Scienca Revuo n^o 100/101, 1973.), la kun-rilata sonbendo havebla ĉe la Magnetofona Servo de U.E.A.

2. LA AKCENTO EN KOMPLEKSASJ VORTOJ

2.1/ ENKONDUKO

Laŭ la regulo n^o 10 en la Fundamento de Esperanto, la akcento en du-silaba aŭ plur-silaba vorto estas ĉiam sur la antaŭ-lasto silabo; tio signifas: la antaŭ-lasto silabo estu prononcata pli forte ol la aliaj.

Aplikante ĉi tiun regulon, necesas distingi radik-vortojn kaj derivitajn vortojn, unu-flanke, kaj kompleksajn vortojn, alia-flanke.

2.2/ RADIK-VORTOJ KAJ DERIVITAJ VORTOJ

Jen kelkaj tipaj ekzemploj de du-silabaj kaj plur-silabaj radik-vortoj kaj derivaĵoj, kun la rilataj prononco-skemoj: A - akcentita silabo; n - neakcentita silabo. (La akcentitaj silaboj presitaj per kursivaj literoj).

A n : *bani*, *danko*, *hejme*, *super*, *tamen*, *kontraŭ*; *laŭte*, *maltra*.

n A n : *abstrakta*, *informi*, *lakone*, *radio*, *trombono*; *am'ind'a*, *bak'ist'o*, *trink'ej'o*, *ge-patr'o*j.

n n A n : *akapari*, *botanika*, *romantike*, *pozicio*; *cerb'um'ad'is*, *instru'ist'o*j, *lern'ej'estr'o*j, *mang'il'ar'o*.

n n n A n : *akuzativo*, *entuziasme*, *filozofio*, *individua*, *varieteto*; *blond'ul'in'et'o*, *sam'ide'an'o*, *lern'ej'estr'in'o*.

n n n n A n : *paralelogramo*, *universitato*, *hiperboloideo*, *arkeologio*; *eventual'cc'o*, *imperial'ism'o*, *lokomotiv'ist'o*j, *administr'ant'ar'o* k.a.

2.3/ KOMPLEKSASJ VORTOJ

2.3.1/ En kompleksaj vortoj konsistantaj el du mem-staraĵ vort-elementoj (radikvortoj aŭ derivitaj vortoj), ambaŭ vort'elementoj konservas sian propran akcenton certa-grade, same kiel estas en la kompleksaj vortoj de aliaj lingvoj kun aglutina strukturo (ekzemple la anglaj kaj la germanaj).

Tiu implicita fundamenta regulo estas grava, ĉar ĝi ebligas klare distingi kompleksajn vortojn (ekzemple: *kon'*-malĉano, *mon'*-aĵero, *gten'*-provizo, *ban'*-sezono, *tri'*-angulo) disde radik-vortoj (ekzemple: *kapi'*-tano, *passaĝero*, *mobilizo*, *telefono*, *molekulo*) kaj derivitaj vortoj (ekzemple: *kongres'ano*, *metal'ero*, *galvan'izo*, *elektr'ono*, *proksin'ulo*). Krome, la du akcentoj en du-elementaj vort-kunmetoj reliefigas la naturrecon, la bel-sonecon kaj la vivantecon de la interlingvo Esperanto.

Por evidentigi orel-trafe tiun regulon, jen du karakterizaj test-frazoj:

a/ Mi ŝatas pomo-torton kaj pomo-sukon, sed ne pomo-vinon. - En ĉi tiu frazo, la post-flankaj vort'elementoj (-*torton*, -*sukon*, -*vinon*) ricevas pli fortan akcenton ol la frontflanka (pomo-), por ke oni povu klar'-videble distingi la diversajn pomo-produktojn menciitajn.

b/ Mi ŝatas pomo-torton, pruno-torton kaj ĉerizo-torton, sed ne abrikoto-torton. - En ĉi tiu frazo, la front'flankaj vort'elementoj (pomo-, pruno-, ĉerizo-, abrikoto-) ricevas pli fortan akcenton ol la post-flanka (-*torton*), por ke oni povu klar'aŭdeble distingi la diversajn *torto*-specojn menciitajn.

Kiam la senco de la frazo ne implicas komparaĵojn (kiel tiujn en la du ĉi supraj test-frazoj) inter vort-kunmetoj, la akcentoj en artikolaj vort-elementoj povas esti proksimume sam-fortaj. Tamen, laŭ natura lingvo-sento, Esperanto-parolantoj ofte inklinaĵoj pli forte akcenti la front'flankan vort'elementon, ĉar ĉi tiu havas la funkcion precizigi la sencan de la post'flanka. Ekzemple, la prononco "pomo-vino". kio estas rekte komparebla al tiu de "vino el pomo" (ne: "vino el pomo"!) sonas tute nature, same kiel tiu de la angla "apple-drink" (ne: "apple-drink"!) kaj ankaŭ tiu de la germana "Apfel-Wein" (ne: "Apfel-Wein"!). Male, la prononco "pomovino" (kun nur unu akcento, nome sur la antaŭlasta silabo "vi") sonas arte-farite, de ne-nature, ĉar ĝi doras la rararan impreson ke temas pri kvar-silaba radik'vorto (kiel "glicetino", "mandolino", "tamburino", "limuzino" k.a.) aŭ pri derivita vorto (kiel "bel'ulino", "dom'estrino", "lav'istino" k.a.).

2.3.2/ Metoda kaj detala esploro pri la akcentado en du-elementaj kompleksaj vortoj, konsiderante la da silaboj kaj de la front'flanka elemento (mallonge front'elemento) kaj de la post-flanka elemento (mallonge post-elemento) estas farita en la jam menciita broŝuro "Maldela prononco de la interlingvo Esperanto" (vidu & 1.6 ĉi supre).

Jen, por ne transpaŝi la kadron de ĉi tiu artikolo, nur tri ekzemploj kun diferenca nombro da silaboj:

a/ "vino-botelo" aŭ "vin'-botelo" (kies prononco estas rekte komparebla al tiu de "botelo por vino"); ne: "vinobotelo" aŭ "vinbotelo" (kies prononco estas komparebla al tiu de "botelo por vino", ĝenerale ne-konvena) sonanta kiel plur-silaba radik'vorto, ekzemple: "viciokonĉelo" aŭ "karuĉelo";

b/ "fabriko-direktoro" aŭ "fabrik'-direktoro" (komparebla al "direktoro de fabriko"); ne: "fabrikodirektoro" aŭ "fabrikdirektoro", sonanta kiel "akumulato" aŭ "inkvizituro";

c/ "procesio-partoprenantoj" aŭ "procesi'-partoprenantoj" (komparebla al "parto-prenantoj je procesio"); ne: "procesiopartoprenantoj" aŭ "procesipartoprenantoj", sonantaj kiel "arbitraciantoj" aŭ "leŭtenantoj".

2.3.3/ Aparte atentindaĵ estas la kompleksaj vortoj, kies post-elemento estas nur du-silaba, kaj precipe kiam la finaĵo -o de la front-elemento estas eliziita. Jen mallonga serio da tipaj ekzemploj:

a/ "vin'-kelo" (t.e. "vino-kelo", kies prononco estas komparebla al tiu de "kelo por vino", ne: "kelo por vino!"); sekve, ne prononci "vinkelo" sonanta kiel tri-silaba radik-vorto, ekzemple: nikelo, cirkelo, bofelto, mantelo kaj similaj;

b/ "Di'-servo" (t.e. "Dio-servo", servo al Dio); sekve, ne prononci "Diservo" sonanta kiel radik-vorto, ekzemple: rezervo, konservi, observi;

c/ "te'-taso" (t.e. "teo-taso", "taso por teo"); ne: "tetaso" sonanta kiel potaso, kompaso, kanvaso, teraso, k.s.;

d/ "atom'-pezo" (t.e. "atomo-pezo", "atoma pezo", "pezo de atomo"); ne: "atompazo" (nek "atom-pezo") sonanta kiel hipotezo, majonezo, parentezo, ekzegezo k.s.;

e/ "staci'-domo" (t.e. "stacio-domo", "stacia domo", "domo de stacio"); ne: "stacidomo" (nek "staci-domo") sonanta kiel astronomo, akxiomo, hipodromo, epitomo k.s.

f/ "genu'-kavo" (t.e. "genuo-kavo", "genua kavo", "kavo de la genuo"); ne: "genukavo" (nek "genu-kavo") sonanta kiel skandinavo, arkitravo, epifafo, paragrafo k.s.;

g/ "industri'-centro" (t.e. "industria-centro", industria centro, centro de industria); ne: "industricentro" (nek "industri-centro") sonanta kiel robodendro, skolopendro, departemento, medikamento k.s.;

h/ "aluminidrato" (t.e. "aluminio-drato", alumina drato, drato el aluminio); ne: "aluminidrato" (nek "alumini-drato") sonanta kiel admiraltato, kinematografo kaj similaj.

La ok ĉi supraj ekzemploj evidencigas ke, en tia-specaj kompleksaj vortoj, estas preferinde ne elizii la finaĵon -o de la front-elemento. Efektive, la vortkunmetoj vino-kelo, Dio-servo, teo-taso, atomo-pezo, stacio-domo, genuo-kavo, industria-centro, aluminio-drato, k.s. sonas pli eŭfonie, malpli abrupte ol vin'-kelo, Di'servo, te'-taso, atom'-pezo, staci'-domo, genu'-kavo, industri'-centro, aluminidratato k.s. Tio tre bone aŭdebligas, kiam oni voĉe legas la ampleksan kolekton da ekzemploj en la § 6.2.1 de la ĉi supre menciita broŝuro kaj kiam oni aŭskultas la rilatan son-bendon.

Estas ree subtrekande, ke la uzo de ligo-streketoj kaj de apostrofoj konsiderinde plifaciligas al legantoj tuj scii, ke ne temas pri la radikvortoj, sed pri vortoj kunmetitaj aŭ derivitaj.

2.3.4/ Restas paroli, ĉi tie, pri la akcento en certaj aliaj du-elementaj vortkunmetoj, nome en tiuj kies front-elemento estas unu-silaba.

La jena listo da ekzemploj ebligas ilustrati la temon:

bo-filino (A: daughter-in-law, G: Schwiegertochter; anstataŭ bofilino, simile al mandolino aŭ bovidino)

dis-meti (A: to take asunder, G: auseinander legen; anst. dismeti, simila al enketi aŭ distingi)

eks-ministro (A: ex-minister, G: Ex-Minister; anst. eksministro, simila al administri aŭ ekskluziva)

ĝi-homo (A: filthy fellow, G: Schweinehund; anst. fiĥomo, simila al legomo aŭ fianĉo)

mis-kompreno (A: misunderstanding, G: Missverständnis; anst. miskompreno, simila al entrepreno aŭ misantropo)

pra-arbaro (A: virgin forest, G: Urwald; anst. praarbaro, simila al samovaro aŭ pravigebla)

du-okula (A: du-eyed, G: zwei-äugig; anst. duokula, simila al molekula aŭ duplikato)

el-iri - iri el (A: to get out, G: hinausgehen; anst. eliri, simila al deliri aŭ elekti)

en-iri - iri en (A: to get in, G: hineingehen; anst. eniri, simila al admiri aŭ enigmo)

for-iri - iri for (A: to get away, G: weggehen; anst. foriri, simila al sopiri aŭ forgesi)

kun-sento (A: fellow-feeling, G: Mitgefühl; anst. kunsento, simila al konsento aŭ kuniklo)

mem-estimo (A: self-esteem, G: Selbstachtung; anst. memestimo, simila al pantomimo aŭ memorando)

mil-foja (A: thousandfold, G: tausendfach; anst. milfoja, simila al levkojo aŭ mildiga)

plu-konduki - konduki plu (A: to carry on, G: weiterführen; anst. plu-konduki, simila al arkiduko aŭ plutokrato)

post-kuri (A: to run after ;. ., G: nachlaufen; anst. postkuri, simila al poluri aŭ postuli)

sub-tera (A: underground, G: unterirdisch; anst. subtera, simila al cetera aŭ subtila)

sur-presi (A: to impress on, G: aufdrucken; anst. surpresi, simila al impresi aŭ surprizi)

tro-trinki - trinki tro (A: to drink too much, G: zuvieltrinken; anst. tro-trinki, simila al konvinki aŭ trofeo)

2.3.5/ Kiam temas pri tri-elementaj vort'kunmetoj, la afero estas simila al tiu de la du-elementaj.

Ekzemple, la prononco de "vin'-ber'-kultivo" (t.e. kultivo de vin'beroj) sonas tute nature kaj eŭfonie; male, la prononco "vinberkultivo" (kun nur unu akcento, nome sur la antaŭlasta silabo "ti") sonas artefarite, do nenature, ĉar similas al kvin-silabaj radik'vortoj, ekzemple demonstrativo aŭ lokomotivo.

2.4/ KONKLUDO

Estas konate, ke la diversaj homaj lingvoj en la mondo estas pli multe parolataj, ol skribataj kaj legataj. Por Esperanto, nun-tempe, estas ankoraŭ la malo: La skriba kaj lega uzo de la lingvo estas pli granda ol la parola uzo.

En la perspektivo ke, iam, milionoj da homoj pli kal pli kutimos paroli ĉi tiun universalan interlingvon, estas necese instrui al la lernantoj kaj lernontoj prononco-manieron laŭ-eble korektan kaj unuforman de la literoj kaj de la vortoj. La ĝusta silabo-akcentado estas aparte grava, precipe en la kompleksaj vortoj, ĉar ĝi estas esenca faktoro faciliganta kompreni kaj komprenigi la parolatan lingvon. Tial, estas dezirinde, ke aŭtoroj de novaj lerno-libroj pritraktu tiun punkton sufiĉe detale, kaj ke la kursanoj metode ekzercu sin dekomence, por akiri bonan regadon pri la prononcado. Tiam Esperanto povos esti konsiderata kiel lingvo vere natura kaj vivanta, same kiel la polaj lingvoj, parolataj en la tuta mondo.